



**Dikuloj
maldikiĝu!**

**Kontraŭkriza
krizo**

Kubo maljuniĝas

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm

Eldonjaro: 2008

Serio Stafeto n-ro: 33

ISBN: 978-90-77066-39-3

Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Europeana: kultura heredaĵo iĝos alirebla por ĉiuj

14



En decembro 2008 estis prezentita la retpaĝo www.europeana.eu, kunlabora projekto de grandaj sciencaj institutoj, arĥivoj, bibliotekoj, muzeoj ktp, subtenata de Eŭropa Unio. Oni intencis igi ĝin la centra serĉilo por trovi informojn stokitajn en cifereca formo ĉe la partneroj. Bedaŭrinde, la sistemo jam la unuan tagon kolapsis

pro la amasa interesiĝo kaj je la jarŝanĝo funkciis nur simpligita versio.

Litovio: La lasta en Eŭropo

18



La nova registaro de Litovio preparis „kontraŭkrikan planon”, kiu baziĝas sur totala ŝparado. La ŝparetoso kaptis ankaŭ la parlamentanojn, kiuj decidis ekde februaro rifuzi 15 % de siaj salajroj. La Eŭropa Komisiono (EK) laŭdis la novajn intencojn de Litovio dirante, ke la rimedoj devus havi sukceson. Tamen ili venas unu jaron poste ol averaĝe en Eŭropo.

Pri la nobla pasio hobia

24

La hobiado en juna aĝo havas alian gravan socian signifon – ĝi helpas al profesia orientiĝo. Ne maloftas la kazoj, kiam hobia transformiĝas al profesio kaj la koncernatoj konsideras sin feliĉuloj, ĉar ili ordinare trovas plenan kontentiĝon. Kelkfoje ĉio komenciĝas per bone organizita kaj lerte gvidata rondeto.



FOTO DE LA KOPRILJO: CONSUMERFRIENDLY

politiko

BURUNDO	8
Ĉu prezidos prezidinto?	
OKCIDENTA AFRIKO	8
Solidaras soldatoj – sed ĉu por demokratio?	
INTERNACIAJ RILATOJ	9
Novaj „ĉapitroj” en najbar-konfliktoj	
LITOVIO	10
Kontraŭkriza krizo	
OKCIDENTA AFRIKO	10
Bele modele	

moderna vivo

BRITIO	11
Profitoj forportitaj	
KULTURO	11
Kanonoj, kanzonoj	
AŬSTRIO	12
Vitista vilaĝo – ravitaj riĉuloj	
UKRAINIO	13
Ulo-kalkulo	
INSTRUADO	13
Fine – „lernejo”!	
JAPANIO	13
Obama Obama-on salutas	
EŬROPA UNIO	14
Europeana: kultura heredaĵo iĝos alirebla por ĉiuj	
TELEFONADO	16
Servo alternative fiksita	
LINGVOJ	17
Diktado-verdikto	
BALKANIO	17
Murdo laŭ mendo	

ekonomio

LITOVIO	18
La lasta en Eŭropo	
KUBO	19
Kubo maljuniĝas	

scienco

Dikuloj maldikiĝu!	20
enigmoj	
Litera sudoku	22
La solvo de la giganta sudoku de Monato 8-9/2007	22

libroj

Posedenda libraĉo	23
-------------------------	----

eseo

ŜATOKUPOJ	24
Pri la nobla pasio hobia	

arto

Ĉina koncerto en Vatikano	26
---------------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonoj ...

> Per via FEL-konto.
 > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
 > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
 > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
 > El Usono per ordinara usona ĉeko.
 > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
 > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
 > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
 > Per bankĉeko traktita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.
 Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	24	27	14,4	5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	24	27	14,4	5	9
Britio	GBP	39	42	23,4	4	7
Bulgario	EUR	26	29	15,6	5	9
Ĉeĥio	EUR	34	37	20,4	5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	40	70
Estonio	EUR	26	29	15,6	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	46	50	27,6	5	9
Grekio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hispanio	EUR	46	50	27,6	5	9
Hungario	HUF	6950	7750	4170	1340	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	42	45	25,2	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1460
Kanado	CAD	76	80	45,6	9	15
Kipro	EUR	34	37	20,4	5	9
Koreio	EUR	42	45	25,2	5	9
Kostariko	EUR	24	27	14,4	5	9
Kroatio	EUR	26	29	15,6	5	9
Latvio	EUR	26	29	15,6	5	9
Litovio	EUR	26	29	15,6	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	34	37	20,4	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	398	430	238,8	45	73
Nov-Zelando	NZD	105	110	63	11	19
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugalio	EUR	42	45	25,2	5	9
Rusio	EUR	24	27	14,4	5	9
Serbio	EUR	25	29	15	5	9
Slovakio	EUR	26	29	15,6	5	9
Slovenio	EUR	34	37	20,4	5	9
Sud-Afriko	EUR	42	45	25,2	5	9
Svedio	SEK	466	499	279,6	49	86
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Usono	USD	78	82	46,8	8	14
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

► aŭ pere de peranto ...

> **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
 > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
 > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
 > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
 > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
 > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
 > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
 > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
 > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
 > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
 > **Germanaj:**
 > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 > Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
 > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
 > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. I/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
 > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
 > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
 > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
 > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
 > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
 > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro

Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
 Rete: esperanto@saluton.net.
 > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr.
 > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Latvia:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
 > **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
 > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: esper_lu@geocities.com.
 > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
 > **Norvegia:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
 > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
 > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
 > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
 > **Ruslandaj:**
 > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-grad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
 > **Slovenaj:**
 > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
 > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: beckford@telkomsa.net.
 > **Svedaj:**
 > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.telia.com.
 > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Kaspreto-teatro



Ĉu vi komprenis tiun bizaran disputon inter Moskvo kaj Kievo pri rusa gaso kondukata tra Ukrainio al landoj en orienta kaj okcidenta Eŭropo? Min ĝi memorigis pri mia infanaĝo, kiam ni spektis Kaspreto-teatron. Ofta scenaro en tiu pupoludo estis persekutado de rabisto fare de Kaspreto; kiam li kaptis la krimulon, Kaspreto batis kaj kun helpo de amiko Joĉjo katenis lin, ĝis fine venis policisto por aresti la rabiston. En la nuna Kaspreto-teatro pri gaso mi ne povis tiel klare distingi inter bonaj kaj malbonaj pupoj, ne sciis, kiu estis rabisto kaj kiu Kaspreto kaj kiu policisto. Kaj kiu haltigis la gason, Kievo aŭ Moskvo? Kontraste al la normala Kaspreto-teatro tiu ĉi infaneca disputo inter du grandaj landoj ne amuzis la spektantojn, ĉar dum la severa vintro suferis pluraj landoj, precipe Bulgario, Rumanio kaj eĉ Serbio, kiu antaŭ nelonge vendis sian gas-entreprenon por simbola prezo al Rusio. Homoj ne povis ridi pri tiu spektaklo, ĉar dum pluraj semajnoj ili ne povis hejti kaj devis frosti en siaj hejmoj, entreprenoj ne povis produktadi pro manko de energio. Vere, ambaŭ disputintaj registaroj konsiderinde perdis reputacion kaj certe daŭros longe, ĝis

ili povos reakiri fidon de cetera Eŭropo.

Nu jes, ĉiu ridindigas sin tiel bone kiel li kapblas. Ridindigas sin nun ankaŭ la bavara registaro. Eble vi memoras, ke antaŭ unu jaro ĉi-loke mi mokis pri la leĝoj de protektado kontraŭ fumado en diversaj germanaj federaciaj landoj („Fum-karnavalo“, MONATO 2008/2, paĝo 5). La plej rigoran leĝon tiam realigis ĝuste Bavario, sed tio vekis daŭran proteston de vastaj rondoj kaj fine dum elektoj al la parlamento la tiam sole reginta partio CSU (Kristan-Sociala Unio) draste perdis mandatojn, onidire ankaŭ pro la fumleĝo. Nun la nova registaro (de CSU kaj liberala partio FDP) mildigis la leĝon, tiel ke ekzemple en malgrandaj trinkejoj kaj en grandaj festotendoj oni denove rajtas fumadi laŭplaĉe. Fidinda kaj honesta politiko estus alia. Registaro aganta tiel ne povas eviti riproĉon de oportunismo, se subite ne plu validas la antaŭaj argumentoj pri protektado de sano por nefumantoj. Sed ni ja kutimiĝis al arbitreco de politikistoj, ne nur en Bavario.

Sincere via

Stefan Maul

Stefan MAUL

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 30a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono.
Telefono/faksilo (216) 297-0370.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Strikis en sekurecaj kondiĉoj

En sia artikolo *Koro, kiu neniam serbe batis* (MONATO 2008/6, p. 8) Zlatoje Martinov skribis, ke la „polico murdis 32 ministrojn, kiuj protestis en la minejo Stari Trg” en Kosovo. Kiel kaj kiam okazis tio? Respondon mi ricevis el artikolo de Miomir Savić el la beograda ĵurnalo *Politika* de la 4a de marto 1989, sub la titolo „Ministoj de Stari Trg strikis en sekurecaj kondiĉoj” kaj ĝi diras, ke neniuj estas murditaj kaj ke la polico tie ne intervenis. Ŝajne la artikolo de Zlatoje Martinov do enhavas malverojn.

Atanasije MARJANOVIĆ
Serbio

Ĉu demokratio aŭ ne?

En sia „vidpunkto” de februaro (MONATO 2009/2, p. 7) Stefan Maul parolas pri atenco kontraŭ germana po-

licisto, sed tute ne ekzistas pruvo, ke la atenco okazis ĝuste tiel, kiel rakontite. La tranĉilo, pri kiu temas, apartenas al la domo de la poliestro. Estas loka kutimo, ke en tiu sezono antaŭ la domo pendas kuko. Oni povas aliri kaj detranĉi pecon. Do, iu familiano manĝis iom kaj forgesis la tranĉilon antaŭ la domo.

Estas demandoj: Ĉu murdemulo iras al la poliestro sen propra armilo, esperante, ke antaŭ la domo li eble trovos konvenan murdilon? Kial la polico firme kredis la eldiron de la poliestro kaj ne esploris la familion (la polico ne faris tion, tion oni intertempe scias)? Kial oni ne identigis la suspektiton, kvankam li havas bone videblan kaj maloftan tatuon? Do, krom la eldiro de la poliestro ne ekzistas iu ajn certiga pruvo, ke okazis atenco en la raportita maniero.

Tio ne signifas, ke ni estu malaten-

taj pri ekstremuloj. Mi ne pensas, ke ne ekzistas diferenco inter „maldekstra” kaj „dekstra” aŭ „religia” ekstremismoj. Ekstremismo (en la senco de netoleremo pri aliaj opinioj, apliko de perforto ktp) laŭ mi estas eksterpolitika. Politiko – almenaŭ en nia moderna, demokratia senco – malaprobas la aplikon de korpa kaj psika perforto. Tio estas gravega kaj nediskutebla punkto. Pri ĉio alia indas kaj endas diskuti. Ĉiu rajtas havi iun ajn opinion, ĉiu rajtas diri kaj publikigi sian opinion, kaj el tiu rajto estiĝas la devo, ke oni toleru la opiniojn de aliaj homoj, diskutu pri ili, sen minaco aŭ uzo de perforto. Kiu obeas tiun principon, por mi ĉiam estas konvena por interŝanĝo de opinioj. Egale, kiun opinion li havas, kaj al kiu partio li apartenas. Malpermeso de partio, kiu deklaras kaj praktikadas neuzadon de perforto, estus malvenko de la demokratio.

Michael LENNARTZ
Germanio

Ĉu demokratio aŭ ne? (2)

Ni devas ne ekstermi, sed sekigi la brunan marĉon. Ekstremismon oni ne venkas per ekstermismo.

Jens S. LARSEN
Danio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

INTER

Projekto de poŝtkartarto

por la 4-a volumo de nia ĵara libro
“KIOSKO DE LEVANTO – libera, skeptika, interkultura”

Temo: La vorto “inter”, siaj memstaraj formoj & kunmetaĵoj.
Formo: Teksto, desegnaĵo, grafikaĵo, foto ktp. & kombinaĵoj el tiuj.
Formato: Ordinara poŝtkarto (DIN A6, 105 x 148 mm), unu aŭ ambaŭflanke prilaborita
Lingvoj: Ĉefe Esperanto, ĉe aliaj lingvoj laŭeble kun taŭga traduko-klarigo.
Koloroj: Nur nigra-blanka, laŭeble altkontrasta.
Nombro: Maksimume 4 poŝtkartoj ĉiaŭtore.
Sendomaniero: Nur „normal”-poŝta, ne elektronika.
Limdato: 2009-septembro-30

Ĉiuj estas amike invitataj!



Adreso de alsendo:

NULA HORO

AP 270 – C/Esperanto, 3

03170 Rojales (Alicante)

Hispanio

Nova mizero

de Stefan MAUL

Kio okazas en Mez-Eŭropo? En pluraj landoj dum la pasintaj monatoj kreskis malkontenteco de homoj pro ekonomiaj problemoj.

Protestoj kaj manifestacioj multiĝis konsiderinde, kelkaj registaroj spertas seriozajn krizojn. Meze de januaro ekzemple pli ol 10 000 homoj protestis antaŭ la latva parlamentejo, kaj la prezidanto eldiris ultimaton por la registaro pro reformoj kaj minacis alioke dissolvi la parlamenton. Kelkajn tagojn poste en Sofio amaso da homoj manifestaciis kaj interbatalis kun policianoj. Simile en la litova Vilniuso 7000 civitanoj protestis kontraŭ sia registaro. En daŭre nestabila Ukrainio la opozicio postulis abdikon de la prezidanto; homoj fariĝis pli kaj pli furiozaj pro la gasdisputo kun Moskvo, kiu alportis haltigon de produktado kaj maldungojn. La serba registaro promesis rabatojn je gasfakturoj, por preventi protestojn.

Trompataj esperoj

Kiam pluraj orientaj ŝtatoj fariĝis membroj de Eŭropa Unio (EU), la homoj esperis baldaŭan bonfarton. Sed nun, kelkajn jarojn poste, ili vivas preskaŭ same mizere kiel antaŭe kaj sentas sin trompataj. La organizintoj de la manifestacioj en Bulgario esprimis sian malkontenton tiel: „La protesto unuigas la homojn en la deziro, vivi en normala eŭropa lando.” Ĉu ne venis multa mono el Bruselo, ĉu EU ne konsiderinde subvencias la novajn membroŝtatojn? Sed ŝajnas, ke EU-monoj ne alvenas ĉe la homoj, sed malaperas en nigraj kanaloj de korupteco. Tipa ekzemplo estas ĝuste Bulgario, kie daŭre floras korupteco tiamaniere, ke Bruselo eĉ haltigis pagojn pro tio. La registaro en Sofio evidente ne kapablas realigi reformojn.

Elitoj fiaskas

Precipe en la novaj EU-ŝtatoj kreskas furiozeco pri elitoj, kiuj ne kapablis krei rapidan bonfarton de la popoloj. Fakte ja dum kelkaj jaroj floris kaj kreskis grandaj partoj de tiu regiono de Eŭropo. Ekonomia kresko de ofte pli ol dek procentoj, subvencioj el Bruselo, miliardoj da monpruntoj kaj avida okcident-eŭropa labormerkato nutris revojn pri baldaŭa adaptiĝo al okcidenta vivnivelo. Jardekoj de plan-kaj mis-ekonomio – tiel oni kredis – forvaporigos post EU-membriĝo. Kaj efektive tio komence ŝajnis funkcii, ekzemple en la baltaj landoj, kiujn oni tiam nomis „tigroŝtatoj”, ĉar eksplodis salajroj same kiel prezoj de nmoveblaĵoj kaj importoj el okcidento. En Pollando jam mankis laborfortoj, ĉar poloj preferis gajni monon en okcidentaj landoj. Bruselo samtempe provis devigi tiujn ŝtatojn al reformoj kaj tiel stabiligi la junajn demokratiojn.

Sed nun? La socioj en tiuj landoj spertas suferigajn krizojn, multe pli ol en okcidentaj landoj, kiuj relative facile povas reagi al mondvasta ekonomia kaj financa krizo. En okcidentaj ĉefurboj kaj en Bruselo kreskas timoj, ke la novaj eŭropanoj turnos sin for de la malnova Eŭropo, ĉar homoj ofte havas impreson, ke dum la komunisma epoko ili fartis pli bone ol nun. Tiam senlaboreco estis nekonata, loĝantoj vivis sekure, kvankam sur relative malalta nivelo – sed ili ne malsatis. Nun, en la libera merkato, ili perdas postenojn kaj malaltaj socialaj asekuroj ne ebligas dignan vivadon. Ili forgesis, ke la socialisma sistemo kolapsis, ĉar la ŝtatkapitalismo bankrotis.

Pliaj ribeloj?

Kiaj estas la perspektivoj? Fakuloj antaŭvidas ekonomian regreson de



JOHAN RO

Kiam pluraj orientaj ŝtatoj fariĝis membroj de EU, la homoj esperis baldaŭan bonfarton. Sed nun, kelkajn jarojn poste, ili vivas preskaŭ same mizere kiel antaŭe.

minimume dek procentoj en tiuj landoj, kiuj financis sin per fremda mono kaj ne per daŭrema rekonstruado de la ekonomio. Tial oni devas atendi, ke malkresko en la novaj EU-landoj estos multe pli drasta kaj longdaŭra ol en la malnovaj. Ne estas konsolo por ili, ke ankaŭ Rusio suferas gravan krizon. Ankaŭ tie oftigas protestoj. Moskvo profitis dum multaj jaroj per vendado de nafto kaj gaso, sed nun ties prezoj tiel draste plonĝis, ke Rusio atendas por tiu ĉi jaro nur duonon de la enspezoj kompare al la prosperaj jaroj. La registaro tro multe fidis siajn krudfontojn kaj neglektis, simile kiel aliaj ekssocialismaj landoj, rekonstruadon de ekonomiaj kaj industriaj strukturoj. Pliaj ribeloj de la popoloj en orienta Eŭropo do estas atendeblaj. Espereble la junaj demokratioj ne tro forte malstabiligos. La homoj ne meritas fali el unu mizero en alian. ■

BURUNDO

Ĉu prezidos prezidinto?

Anoncis sian prezidanto-kandidaton la ĉefa opozicia partio en Burundo. La Fronto por la Demokratio en Burundo deklaris eksprezidanton Domitien Ndayizeye kandidato por la balotoj okazontaj en 2010.

Ndayizeye naskiĝis en 1953 kaj servis la Burundan Respublikon kiel vicprezidanto inter 2001 kaj 2003 kaj kiel prezidanto inter 2003 kaj 2005. Laŭ la konstitucio li ne rajtis kandidatiĝi kiel prezidanto en 2005.

Li fariĝis prezidanto pro la tiel nomata Arusha-interkonsento, kiu celis repacigi la landon kaj specife la hutuan kaj la minoritatan tutsian etnojn. Okazis du mandatoj, kiam prezidis membro de

la tutsia etno, kun hutua vicprezidanto; kaj poste inverse, hutua prezidanto (Ndayizeye) kun tutsia vicprezidanto. Ilia tasko estis organizi demokratian voĉdonadon kaj krei novan konstitucion, fine aprobitan per 92 % de la popolo en 2005.

Arestita

Postlaprezidantamandato Ndayizeye fariĝis senatano. Tamen, pro influo de la tiam prezidanta partio, la senato retiris la parlamentan protekton de Ndayizeye, kaj li estis arestita. La registaro akuzis lin, ke li volis ĝin renversi, kaj kondamnis lin al dumviva enkarcerigo. Post na-

ciaj kaj internaciaj protestoj li estis post kvin monatoj liberigita.

Elirante el la prizono, Ndayizeye diris: „Mi forlasis politikan karieron, kiam mi eksprezidantiĝis en 2005, ĉar tiam mi faris grandegan laboron por mia lando. Post mia malliberigo pro falsaj akuzoj mi decidis denove aperi en la politika mondo.”

Ndayizeye estas gaja homo, subtenata kaj de sia etno kaj de tutsioj, kiujn li helpis dum sia prezidanteco. Multaj kredas, ke li havas grandan ŝancon en 2010 denove prezidi la landon.

Jérémie SABIYUMVA

OKCIDENTA AFRIKO

Solidaras soldatoj – sed ĉu por demokratio?

Eksigita estas Gvineo el la Ekonomia Komunumo de Okcident-Afrikanaj Ŝtatoj (EKOAS) post eksterordinara kunveno de la komunumo kunvokita de ties prezidanto, la niĝeria prezidanto Shehu Musa Yar'Adua.

La komunumo reagis al la starigo de junto sub majoro Moussa Dadis Camara post la morto de la diktatora prezidanto de Gvineo, generalo Lansana Conte, kiu kaptis la potencon dum ŝtatrenverso en 1984. Ekde tiam Conte rezistis provojn demokratiigi la landon kaj, malgraŭ reformoj, kiuj devigis lin enpostenigi ĉefministron, daŭre retenis potencon.

La subita morto de Conte, en decembro 2008, semis konfuzon en Gvineo kaj lasis truon en la lando, kiun malaltrangaj soldatoj sub Camara tuj plenigis. Ili avertis generalojn lojalajn al Conte, ke ili ne enmiksiĝu en la aferon, ĉar tiel ili povus malstabiligi la landon. La generaloj ŝajne aŭskultis kaj la Nacia Konsilantaro por Demokratio kaj Evoluigo, regata de Camara, promesis organizi elektojn ene de tri jaroj.

Kontraŭis EKOAS, insistante, ke okazu elektoj (planitaj antaŭ la morto de Conte) ene de unu jaro. Pro tio la komunumo suspendis Gvineon.

Simile reagis la komunumo, kiam soldatoj en Togo akaparis la registaron post la morto de generalo Eyadema. Tiam ĝi organizis sankciojn kaj blokadon. Tion riskas ankaŭ Gvineo, se la reganta soldataro ne tuj iniciatas demokratigon de la lando.

Partoprenis la eksterordinaran kunvenon en Abuĝo, ĉefurbo de Niĝerio, la prezidantoj de Niĝerio, Liberio, Ebur-Bordo, Togolando, Gambio, Burkino, Ganao kaj Siera-Leono. Ĉeestis ankaŭ la ĉefministro de Niĝero kune kun reprezentantoj de aliaj ŝtatoj.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Novaj „ĉapitroj” en najbar-konflikto

En decembro 2008 Slovenio blokis plian traktadon de Kroatio por aliĝi al Eŭropa Unio. Kroatio kiel membro-kandidato devas fintrakti kun EU 40 tiel nomatajn aliĝo-ĉapitrojn. Ĝi fintraktis malpli ol dek kaj nun devis malfermi dekon da novaj, sed tion malebligis Slovenio. Slovenio do kiel membro de EU uzas iamaniero veto-raĵton por malrapidigi aŭ malebligi la aliĝon de Kroatio. Kial?

Mara juro

Kiam disfalis Jugoslavio, Kroatio kaj Slovenio interkonsentis, ke komunaj landlimoj restos tiaj, kiaj ili estis en la tago de la proklamo de la sendependiĝo de la du landoj, do la 25an de junio 1991.

Sed la limoj surmare neniam antaŭe ekzistis kaj ne estis fiksitaj per iu ajn dokumento. Slovenio havas fiksitan maran limon kun Italio kaj nefiksitan kun Kroatio, kaj la marbordo de Slovenio estas tre mallonga. Tial la eventuala mara limo, kiu estus logika kaj verŝajna, se ĝin difinus internacia juĝisto laŭ inter-

nacia mara juro, disponigus al Slovenio nur etan triangulan maron, kiu ne havus eliron al internacia maro.

Pro tio Slovenio klopodas interkonsenti kun Kroatio por fiksi maran limon aŭ akiri maran koridoron en la kroata marteritorio por havi sian eliron al internacia maro kaj ne dependi de aliaj landoj rilate sian maran trafikon.

Interkonsento pri markoridoro

Nun, kiam Slovenio kaj Italio estas en EU kaj Kroatio volas aliĝi, la fakto, ke slovenaj ŝipoj devas pasi tra kroata aŭ itala maro por atingi internaciajn akvojn, ne gravas. Nek Italio, nek Kroatio kaŭzas problemojn pro tio. Sed, se iam en la estonteco EU disfalus (kiel ekzemple Sovetio aŭ Jugoslavio), tiam Slovenio povus pro tio havi gravajn malavantaĝojn.

Tial Slovenio klopodas interkonsenti kun Kroatio, estante preta pagi per kontraŭteritorioj kaj aliaj manieroj por ricevi la deziratan marlimon. En 2003 la tiamaj registaroj de la du landoj atingis interkonsenton pri markoridoro

(interkonsento Drnovšek–Račan). Ĝin ratifis ambaŭ registaroj kaj la slovena parlamento. Tamen la kroata parlamento malakceptis ĝin kaj tiel ĝi neniam fariĝis valida. Poste ne plu Kroatio pretis pri tio trakti kaj interparoli.

Kroatio havas 31 067 kvadratajn kilometrojn da mara surfaco, kaj per la menciita interkonsento ĝi pretis fordoni al Slovenio 119 kvadratajn kilometrojn. Tio estas unu 260-ono de ĝia marteritorio. Se tio okazus, la nura malavantaĝo por Kroatio estus la perdo de la fiŝkaptado en tiu teritorio. Kroatio jare kaptas 32 000 tunojn da fiŝoj, kio signifas, ke ĝi perdus 260-onon de tio, do ĉirkaŭ 120 tunojn jare. Tio estas valoro de proksimume 200 000 eŭroj. Militistan aŭ alian ekonomian perdon ĝi ne havus.

Subvencioj

Slovenio nuntempe rajtas ricevi subvenciojn el EU jare ĉirkaŭ 800 milionojn da eŭroj. Pro tio, ke Kroatio estas duoble pli granda kaj teritorie kaj loĝantare, kaj duone malpli evoluinta ekonomie, verŝajne ĝi akirus rajton pri eŭropaj subvencioj de sumo inter unu kaj du miliardoj da eŭroj. Ĉiu jaro da nemembreco en EU sekve portas al Kroatio perdon de tiu mono.

Ne volante interkonsenti kun Slovenio, Kroatio do perdas miloble pli grandan sumon, ol ĝi malgajnus per fordonado de iom da sia marteritorio. Krome ĝi prokrastas la momenton komenci sanigi sian ege malsanan ekonomion.

Slovenio havas la atuton en la mano. De ĝi dependas la tempo, kiam Kroatio aliĝos al EU. Slovenio pretas pagi tion, kion ĝi volas aĉeti, sed Kroatio insiste daŭrigas sian nepretecon akcepti la „komercon”.

La situacio ege negative influas al politikaj kaj interhomaj rilatoj kaj daŭre kreas malamojn kaj malestimojn inter la du loĝantaroj.

Zlatko TIŠLIAR



Slovenio klopodas interkonsenti kun Kroatio por fiksi maran limon aŭ akiri maran koridoron en la kroata marteritorio.

LITOVIO

Kontraŭkriza krizo

Protestoj kaj tumultoj akompanis la komencon de dekstrula regado en Litovio. En decembro pasintjare protestis muzikistoj ekster la parlamentejo pro decido altigi honorariajn impostojn de 15 % ĝis 21 %. Plendis ankaŭ eldonistoj kaj ŝoforoj, fajrobrigadistoj kaj policistoj pro impostoj.

En januaro organizis novan proteston la sindikata unuiĝo por atentigi pri registaraj planoj pri ŝparado. La protestoj ne celis forigi la registaron, sed, laŭ la estro de la unuiĝo, montri, kiom la ŝparado premas precipe la plej mizeran socian tavolon.

La sindikatoj volas, ke la registaro ne malgrandigu salajrojn, ne privatigu strategiajn ŝtat-posedaĵojn, ne liberaligu la laborrilatojn, ne reduktu ŝtatajn administrajn elspezojn kaj ne kreu novajn ministrejojn. Samtempe ili avertas, ke, se la registaro ne reagos, ĝi atendu naciajn strikojn.

Neĝbuloj

La protestoj komenciĝis trankvile, sed ju pli ardis la paroladoj, des pli ekscitiĝis la 7000 protestantoj sur la Placo de Sendependeco. Per neĝbuloj oni atakis la fenestrojn de la parlamentejo. Sekvis ovo kaj ŝtonoj. Frakasitaj estas dekoj da vitroj; tridekoj da homoj bezonis medicinan helpon; kaj la polico arestis pli ol 150 manifestaciantojn.

La dekstrula registaro alvenis je plej maloportuna ekonomia momento. Ĝia tiel nomata kontraŭkriza plano konsistas en altigo kaj kreo de diversaj impostoj. Spertuloj ne konsentas pri la projekto. Kelkaj taksas ĝin tro milda; kelkaj bona; kaj aliaj kredas, ke ĝi kondukos al nova

ondo da bankrotoj. Nur la popolo havas firman opinion: la plano ne taŭgas, ĉar ĝi ĉiun mizerigas.



Litovoj protestas kontraŭ la politiko de la nova dekstra registaro.



LAST



LAST



LAST

Per neĝbuloj oni atakis la fenestrojn de la parlamentejo.

OKCIDENTA AFRIKO

Bele modele

En decembro 2008 enoficiĝis nova prezidanto en Ganao. Profesoro John Atta Mills, 64-jaraĝa, transprenis povon sen ajna malstabiligo en la lando. Tiel Ganao, unu el la plej gravaj landoj en okcidenta Afriko, prezentas modelon al tuta Afriko.

Mills, el la opozicia partio Nacia Demokratia Kongreso, venkis la partion de la reganta prezidanto, John Kuffour. Mills, jam vic-prezidanto dum la ok-jara regado de la iama prezidanto Jerry Rawlings, du fojojn provis prezidantiĝi, sed ĉiam estis venkita ĉe la urnoj.

Ĉi-foje, el 26 kandidatoj, li sukcesis, post kiam elekta komisiono organizis finan balotadon, ĉar neniu kandidato en la unua balotado gajnis 50 % de la voĉoj. Fine subtenis Mills 50,5 % de la elektintoj, kontraste al 49,5 % por la kandidato de la reganta Nova Patriota Partio, Nana Akufo-Addo.

La nova prezidanto promesis fariĝi prezidanto por ĉiuj 22 milionoj da ganaanoj. Bona indiko estas, ke inter la gastoj ĉe la ceremonio por festi la sukceson de Mills estis la venkita prezidanto-kandidato Akufo-Addo.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Profitoj forportitaj

Vintre en Weston-super-Mare [ŭestan-supa-mea], marborda feriejo en sud-okcidenta Britio, okazas historia karnavalo. Ĝi originis en la jaro 1605 por celebri la malsukceson de romkatolika komploto detrui la protestantan parlamenton de Anglio.

Komence la karnavalo konsistis el simpla procesio kun homoj kantantaj kaj svingantaj fajrilojn. Nuntempe traktoroj tiras grandajn ekspoziciaĵojn brile iluminatajn kaj akompanatajn de laŭta, sonbendigita muziko. Ne plu la karnavalo festas la fiaskigon de romkatolika komploto, sed instigas la publikon mondonaci al almozaj fondaĵoj. Registritaj monkolportistoj akompanas la procesion, proponante sitelojn, en kiujn oni ĵetas monerojn.

Sorĉvergoj

En 2008, tamen, organizantoj de la karnavalo plendis, ke kolportistoj forrabis de la almozaj fondaĵoj proksimume 25 000 britajn pundojn (27 500 eŭrojn), vendante lumajn sorĉvergojn, ekbrilajn torĉojn kaj ruĝbrilajn kolĉenojn. La 2008-a enspezo por la diversaj fondaĵoj falis de 22 000 pundoj en 2007 al nur 11 000 pundoj.

La prezidanto de la karnavalo-komitato, Brian Coombes [brajan kumz], diris, ke proksimume 200 kolportistoj grave bremsis la sukceson de la evento, kiu devis toleri ankaŭ pluvegon. „Ili pagas malmulte por siaj permesiloj kaj povas leĝe komerci ie ajn, dum oficialuloj ne povas haltigi ilin. Ili venis al nia karnavalo el ĉiuj partoj de la lando kaj foriris, redoninte nenion.”

Akto

La loka konsilantaro povus mem regi strat-komercadon pere de loka parlamenta akto, kiel oni faris en aliaj urboj. Tio, tamen, kostus al la konsilantaro



Buntas la karnavalaj ekspoziciaĵoj, sed malbuntas la karnavalaj profitoj.

45 000 pundojn (50 000 eŭrojn), kio ne eblas pro la nuna ekonomia situacio. Povas nur koleri karnavalo-organizanto Steve Townsend [stiv taŭnzend]: „La celo estas donaci al almozaj fondaĵoj, sed kolportistoj venas pro propra profito.”

Ne ĉiu, tamen, kulpigis la kolportistojn. Karnavalo-ĉeestinto Jo Payne [ĝo pejn] opiniis: „Spektantoj de la karnavalo havas elekton, kaj se ili volas aĉeti sorĉvergojn kaj torĉojn, ili rajtas. Se la karnavalo-enspezo estis vere malpli ol en 2007, kulpis probable la aĉa vetero. Gepatroj saĝe ne permesis al siaj infanoj ĉeesti en tia vetero. Cetere stratvendistoj plibonigas la etoson kaj ĝuigas, kvankam multekoste, multajn infanojn kaj vizitantojn.”

Aliaj spektintoj demandis, ĉu vere temis pli 200 kolportistoj, kiel diris organizantoj. Multaj kredis, ke la malsukceson kaŭzis, se ne la kolportistoj, aŭ la vetero, do la financa krizo.

David CURTIS

KULTURO

Kanonoj, kanzonoj

Muziko kaj milito: jen la temo de koncerto okazinta en junio en la albana ĉefurbo Tirano, kiam la kanto-aŭtoro kaj eksa soldato James Blunt [ĝejmz blant] ravigis spektantojn. Blunt, brito, deĵoris antaŭ kelkaj jaroj en Kosovo kiel komandanto de la tieaj britaj pacgardistoj. Militista kariero tamen ne malhelpis ankaŭ artan. Spektantoj, kiuj plenplenigis la centran stadionon en Tirano, ĝuis ne nur belajn kanzonojn kiel „Mi amas vin, belulino”, sed ankaŭ vidaĵojn el la milito en Kosovo elektitajn de la artisto mem.

Bardhyl SELIMI

AŬSTRIO

Vitista vilaĝo – ravitaj riĉuloj

De jarcentoj la vilaĝo Grinzing [grincing] estas alloga vidindaĵo por turistoj, kiuj vizitas Vienon. En gastejoj la vitistoj vendas la propran vinon laŭ privilegio donita de la germana imperiestro Jozefo la Dua en la 18a jarcento. La ekstera signo por tio estas konifera fasko. Oni nomas tiujn ejojn germane *Buschenschank* aŭ *Heuriger* (drinkejo por ĉi-jara vino).

Dum la lastaj jaroj multaj vitistoj ne povis vivi de la vendado de propra vino. Ili proponas vinon el aliaj regionoj de Aŭstrio aŭ eĉ de eksterlando. *Heuriger* iĝas tial normala restoracio. Ofte ankaŭ la juna generacio ne volas peze

labori en vitejo aŭ stari la tutan vivon en gastejo. Krome la konsumado de alkoholaĵoj eksmodiĝas. La sekvo estas la alikonstruado de vitistaj domoj al loĝdomoj por riĉuloj. El 180 *Heuriger* antaŭ 30 jaroj restas en 2009 nur 12. Sur la vitejoj kreskas arboj – la Viena Arbaro etendiĝas.

Turistoj, kiuj buskvante venas al Grinzing, ne multe rimarkas. La fasadoj de la ĉarmaj vitistaj dometoj estas bele renovigitaj. Apude en ampleksa restoracio oni trinkas aliregionan vinon, aŭskultante laŭtan muzikon, laŭdire ti-pan por Vieno.

La Asocio de la amikoj de Grinzing

atentigas pri la ŝanĝoj en la vilaĝo kaj volas, ke ĝi fariĝu mondheredaĵo sub aŭspicio de Unesko. Tiel konserviĝu la originala impreso de vitista vilaĝo.

Walter KLAG



La finhaltejo de la tramlinio 38 en Grinzing.




Ekstere ne multo ŝanĝiĝis – male, tamen, malantaŭ la pitoreskaj fasadoj.



La ĉefplaco de Grinzing, kie la amikoj de la vilaĝo volas, ke ĝi estu konservata.

Obama Obama-on salutas



A parte en unu urbo de Japanio oni bonvenigis la venkon de la usona prezidento Barack Obama —, en la urbo Obama.

La 5an de novembro 2008 en Obama, malgranda urbo apud Japana Maro, ariĝis 200 homoj por spekti programon pri la elekto de la venonta usona prezidento. Dume grupo nomata Obama-gejunuloj (verdire ne-gejunuloj) dancis la hulaon de Havajo, de kie devenas Obama. Kiam Obama deklaris sian venkon, la salono pleniĝis de ripeta-taj ĝojkrioj: „Jes, ni povas!”.

La urbestro de Obama, s-ro Macuzaki, diris: „Ni pli progresigu la amikan rilaton kun Honolulo, Havajo, kaj samtempe disvastigu nian urbonomon Obama. Mi volas inviti s-ron Obama al nia urbo.” Cetero, kiam la japana ĉefministro Asoo parolis per telefono kun Obama, tiu respondis: „Mi jam vizitis Japanion, kaj mi konas la urbon Obama.”

Poste kolektiĝis samloke pliaj entuziasmoj por dua festo, dum kiu salutis la ambasadoro de Kenjo, kie loĝas la avino de Obama. Fine la festantoj deklaris planon ĉeesti la instalan ceremonion de la nova prezidento kaj danci hulaon antaŭ la Blanka Domo.

HORI JASUO

Ulo-kalkulo

Ĉie en la mondo ekzistas homoj, kiuj ne havas propran loĝlokon kaj devas tamen ie tranokti. En la urbo Kremenčuk, en la provinco Poltava, oni provis nombri, kiom da tiaj homoj vivas tie.. Dum du tagoj policianoj okupiĝis pri la nombrado. Ili trovis en keloj, subtegmentoj aŭ surstrate entute 98 tiajn personojn. La polico ilin fotis, prinotis kaj liberigis. Jen verŝajne la unua fojo, ke oni provis tiel nombri senhejmulojn en Ukrainio.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

INSTRUADO

Fine – „lernejo”!

La esperanta vorto „lernejo” tradukeblas en la angla per *school* [skul]. Tamen, almenaŭ por lernejo en la nord-angla urbo Sheffield [ŝefild], la vorto „school” kunportas tro da negativaj kromnocioj. Rezulte nova lernejo, kiu malfermis siajn pordojn en januaro, decidis rezigni pri la tradicia priskribo *school* kaj adopti – sendube tute senkonscie – anglan ekvivalenton de la esperanta kunmetaĵo „lernejo” – angle *place for learning*.

Apenaŭ imageblas, ke la iom peza, kvarsilaba neologismo enradikiĝos. Edukaj instancoj en Sheffield insistis, ke malgraŭ la decido de la lernejo mem, ĝi restos oficiale „school”. Reprezentanto de la lernejo diris: „Ni volas senformaligi la ejon kaj pliproksimigi ĝin al la reala vivo”. Ĉu vere al la reala vivo diskutblas – certe tamen iomete al la spirito de Esperanto.

Paul GUBBINS

Europeana: kultura heredaĵo iĝos alirebla por ĉiuj

En decembro 2008 estis prezentita la retpaĝo www.europeana.eu, kunlabora projekto de grandaj sciencaj institutoj, arĥivoj, bibliotekoj, muzeoj ktp, subtenata de Eŭropa Unio. Oni intencis igi ĝin la centra serĉilo por trovi informojn stokitajn en cifereca formo ĉe la partneroj. Bedaŭrinde, la sistemo jam la unuan tagon kolapsis pro la amasa interesiĝo kaj je la jarŝanĝo funkciis nur simpligita versio.

Ĝis antaŭ nelonge eblis eltrovi nur tion, kio estas en iu kolekto, konsultante ĝian libroforman aŭ sliparan katalogon (se entute estis tia katalogo). Iom post iom tiuj katalogoj estis enkomputiligitaj kaj iĝis pli facile alireblaj, unue nur surloke, sed nun plej-ofte jam interrete, do el ĉies hejmo aŭ oficejo.

Tiel scienca esploristo aŭ simpla intereso jam antaŭe povas prepari sian viziton al biblioteko aŭ muzeo, sed persona vizito restas necesa por konsulti iun libron aŭ rigardi iun objekton. La rapida disvolviĝo de komputila potenco kaj Interreto ebligis la ciferecigon kaj interretan distribuon kaj traserĉadon de la en-

havo de libroj kaj de bildoj de objektoj. Komence tio okazis neordigite kaj fojfoje amatore. Nun la teknikoj maturiĝis kaj ellaboro de unuecaj labor- kaj konsult-metodoj iĝis ebla kaj farenda.

Gazetoj pioniris

Tagaj kaj semajnaj gazetoj estas produktitaj por rapida legado kaj posta forĵeto, ne por longatempa arĥivado kaj intensa konsultado. Tamen, ili feliĉe estis arĥivitaj kaj post jardekoj aŭ jarcentoj ofte konsultataj. Por ne difekti la originalojn, la plej valoraj kolektoj jam delonge estis mikrofilmitaj kaj nur la mikrofilmoj estas konsulteblaj, dum la originaloj restas sekure stokitaj. Kiam

aperis potencaj skaniloj, oni kelkloke komencis ciferecigi la dokumentojn, skanante la mikrofilmojn aŭ la originalajn dokumentojn.


Komence tio okazis eksperimente kaj per diversaj teknikoj (kaj i.a. evidentiĝis, ke skanado de mikrofilmoj ne donas bonan rezulton), sed intertempe establiĝis ĝenerale akceptataj proceduroj. Bonaj ekzemploj de lokaj iniciatoj estas la malnovaj gazetoj de la urbo Oostende (god.biboostende.be/, tiam precipe franclingvaj) en Belgio kaj Roermond (www.gemeentearchief.roermond.nl/index50504.htm) en Nederlando. Ankaŭ pluraj gazetoj mem en iu formo disponigas la enhavon de siaj malnovaj numeroj al la publiko, ekzemple la brita *The Times*, la usona *New York Times* kaj la germana *Der Spiegel*.

Studotago

Same kiel en aliaj landoj, ankaŭ en Belgio sentiĝis la bezono pli sisteme aliri la taskon de ciferecigo. La 14an de novembro 2008 la Belga Reĝa Biblioteko (www.kbr.be) organizis studotagon, dum kiu la projektoj estis prezentitaj. En 2007 oni komencis ciferecigi kelkdekojn da titoloj de la belga gazetaro inter 1830 kaj 1950. Tute ne estas la kompleta gazetaro de tiu epoko: konsiderante la disponeblajn rimedojn, oni elektis la plej



6a de februaro 2009 - la sistemo daŭre ne funkcias plej bone, pro diversaj testoj ĝi uzeblos nur kiel "beta"-versio kun multaj limigoj.



Diversaj leĝoj pri aŭtoraj rajtoj signife bremsas evoluon de Europeana.

gravajn gazetojn laŭ lingvo, laŭ regiono, laŭ ideologio, ktp.

Ĝis nun unu miliono da paĝoj estas skanitaj kaj en 2009 ili iĝos konsulteblaj interrete. Ne nur videblas la bildo de la gazeto, sed danke al optika tekstorekono eblos ankaŭ traseri la tekstojn. La tekstoj ne estas centelcente ĝustaj (tio plumbigis la kostojn), sed tamen sufiĉe ĝustaj por igi esplorojn fidindaj. Kunlabore kun specialigita esplorinstituto (www.cegesoma.be) oni disponigos ankaŭ ĉiujn cenzuritajn kaj kaŝajn gazetojn, kiuj aperis en Belgio dum la du mondmilitoj.

Juraj problemoj

La tempolimon (ĝis 1950) oni ne fiksis hazarde. Unue estas teknika kialo. Dum la amplekso de la malnovaj gazetoj malofte superis dek paĝojn, ĝi kreskis dum la dua parto de la jarcento al plurdekoj da paĝoj kaj fine de la jarcento semajnfinaĵaj gazetoj de pli ol cent paĝoj ne estis esceptaj. Ciferecigo de tia giganta kvanto kun la nunaj rimedoj ne eblas.

La ĉefa kialo estas jura: la aŭtoraj rajtoj. La temo estas tro komplika por detale priskribi ĝin, sed ĝis antaŭ kelkaj jaroj validis ĝenerala regulo, ke aŭtoraj rajtoj validis ĝis 50 jaroj post

la morto de la aŭtoro. Intertempe la Eŭropa Parlamento (sekvante usonan ekzemplon, sed nesufiĉe pripensante la konsekvencojn) plilongigis tiun periodon ĝis 70 jarojn post la morto de la aŭtoro. Elektante la jaron 1950 la Reĝa Biblioteko do evitas grandan parton de la eblaj problemoj, sed ne ĉiujn. La reprezentantoj de la eldonistoj dum la studotago klare esprimis sian intencon laŭeble protekti la aŭtorojn, t.e. klopodi enkasigi laŭeble multe da mono pro aŭtoraj rajtoj.

Labirinto de reguloj

Dum la studotago la juristo Joris Deene klarigis, kiel la sistemo de aŭtoraj rajtoj evoluis de helpo al aŭtoro al labirinto de reguloj, en kio ĉio iel povas esti malpermesata. Li komencis per citaĵo de la franco Voltaire: „*un droit porté trop loin devient une injustice*” (troigita rajto iĝas maljustaĵo). Dum la mezepoko la principo de aŭtoraj rajtoj ne ekzistis. Kontraŭe, scienco estis konsiderata kiel dia donaco, senpage disdonenda. La unuaj leĝoj celis limigi la monopolon de eldonistoj kaj havigi al aŭtoroj ŝancon por diskonigi siajn ideojn.

Kontraŭe, la nuna leĝaro riskas malebligi diskonigon. Pro la tro longaj periodoj abundas komplikaĵoj, ekzemple

la „orfaj” verkoj, tiuj estas tekstoj de eldonejoj, kiuj malaperis, aŭ de aŭtoroj, kiuj mortis sen lasi heredantojn. Malvasta apliko eĉ malebligis ĵurnalismen: neeviteblas, ke unu ĵurnalisto iel kopias tekstojn de kolegoj, se ne, unu novaĵo povus esti diskonigata nur unufoje. Do necesas tute reipensi la nunan sistemon de aŭtoraj rajtoj. Joris Deene finis, citante alian francon, Victor Hugo, el ties inaŭgura parolado dum la internacia literatura kongreso de 1878: „*Si l'un des deux droits, le droit de l'écrivain et le droit de l'esprit humain, devait être sacrifié, ce serait, certes, le droit de l'écrivain.*” (Se unu el tiuj du rajtoj, la rajto de la verkisto kaj la rajto de la homa spirito devus esti oferita, tio certe devus esti la rajto de la verkisto.)

Alia ekzemplo: historiaj mapoj

Dum ĉe la publiko plej multe da atento ricevas la ciferecigo kaj enretigo de libroj, restas en la arĥivoj valoraj trezoroj apenaŭ konataj. Inter tiuj estas miloj da malnovaj mapoj, ĉu de privataj posedaĵoj, ĉu de urboj, ĉu de regionoj. La projekto DIGMAP (portal.digmap.eu/) ĝis nun grupigas nur limigitan kvanton da eŭropaj bibliotekoj, sed jam disponigas milojn da zorge skanitaj mapoj el la tuta mondo. Ilia pristudo multe helpas al lokaj kaj landaj historiistoj.

Ekzemplo de landa projekto: Kroatio

Meze de 2008 en Zagrebo estis prezentita la interreta portalo „Kroata kultura heredaĵo” (www.kultura.hr), kiu donas aliron al ciferecaj kolektoj de kroataj arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj. Elstara parto de ĝi estas la jarkolektoj 1950-2007 de la gazeto *Glas Podravine*. Tiel Kroatio jam montras je landa nivelo kion Europeana celas atingi je eŭropa nivelo. Samtempe tamen aperis problemoj: la enhavo de www.kultura.hr povas esti interesa ne nur por kroatoj sed ankaŭ por personoj en la tuta mondo, kiuj iel interesiĝas pri la lando kaj ĝia historio kaj kulturo, sed konsulti ĝin sen koni la kroatan lingvon apenaŭ eblas.

Roland ROTSART

Servo alternative fiksita

Ankoraŭ aŭdeblas plendoj – sed telefon servo en Kubo iom post iom pliboniĝas post gravaj ŝanĝoj trafintaj dum 2008 la tutlandan telefon-entreprenon ETECSA.

Plej gravas la zorge pripensita decido transiri al libera programaro. Ekde printempo 2008 oni malpli aplikas vindaĵajn solvojn. La decido estas logika kaj komprenebla. Temas pri malriĉa lando kun severe limigitaj kapabloj komercaj, kaj preskaŭ neniuj instalita kopio de la operaciumo *Vindozo* estas laŭleĝa. Ne eblas agi alimaniere, pro memkompreneblaj kialoj. Krome, la deŝuton de programoj el interretaj servoj ofte baras leĝaj malpermesoj, ĉar Kubo troviĝas en „nigra listo”.

Tutlanda reto

Gravas due la plimultiĝo de instalaĵoj (nun pli ol 30 000) de la tiel nomata Al-

ternativa Fiksa Telefonservo, kiu uzas la teknologion de poŝtelefonoj por komunumaj telefonservoj. Ĝis nun pli ol 3500 publikaj, fiksaĵ telefonaparatoj en malfacile alireblaj komunumoj estis instalitaj, kaj oni esperis atingi la ciferon 4200 fine de 2008. Tiamaniere 581 komunumoj (kun pli ol 300 loĝantoj) kaj 1531 loĝlokoj, malfacile kaj nur multekoste atingeblaj per kutimaj, fiksaĵ telefon servo (ekzemple montaraj lokoj), estas alligitaj al la tutlanda reto. Se ne, oni devus atendi ankoraŭ jarojn.

Aliflanke, eĉ en la ĉefurbo la kutima, fiksa telefonservo estas celobjekto de plendoj, ĉar la atendolistoj de dezirantoj havi propran, hejman telefonaparaton ĉiam kreskas. De tempo al tempo oni disponigas limigitan kvanton da pliaj instalaĵoj hejmaj por difinita urboparto, kun rigora selektado de bonŝanceloj laŭ difinitaj kriterioj (la graveco de la la-



La publika telefonservo daŭre anstataŭigas la malnovajn monerajn aparatojn per kartaj.

borposteno de la deziranto, ekzisto de malsanuloj ktp).

La solvo bazita sur la Alternativa Fiksa Telefonservo postulas limigitan tempon por uzantoj, ĉar mankas rimedoj. La afero komplikiĝis pro la plimultiĝo de la mesaĝoj SMS (servo de mallongaj tekst-mesaĝoj) senditaj ĉefe de kuraĉistoj laborantaj eksterlande. Tio devigis la entreprenon ĉesigi la servon, verdire ne difinitan en la kontrakto. Tamen, oni anoncas por 2009 reaparon de la servo, sed nur por tiuj, kiuj rilatas al sanserva kunlaboro en eksterlando.

La publika telefonservo, aliflanke, daŭre anstataŭigas la malnovajn monerajn aparatojn per kartaj. Tamen telefonkartoj ne kontentigas: nur la tiel nomata *Propia*-karto (esperante: propra) estas reŝargebla.

Poŝtelefonoj

Tria grava decido rilatas al poŝtelefonoj. Ekde aprilo 2008 kubaj civitanoj rajtas kontrakti pri servoj de poŝtelefonado (antaŭe oni devis trovi eksterlandanon, kiu aperis en la kontrakto kiel uzanto), sed nur kontraŭ alta tarifo en konverteblaj kubaj peso (CUC), do afero nepensebla por la plimulto. Bonŝance fine de 2008 oni decidis duone rabati la tarifon. Kvankam ĝi restas alta (60 CUC) kaj ankaŭ la monata tarifo altas, la decido estas bonaŭgura.

Alberto García FUMERO



Ĝis nun pli ol 3500 publikaj telefonaparatoj en malfacile alireblaj komunumoj estis instalitaj.

Diktado-verdikto

Litovoj, kiel pluraj aliaj popoloj en la mondo, decidis pruvi, ke ankaŭ ili amas sian gepatran lingvon. Por realigi tiun ideon ili organizis amase nacian diktadon. Ĉi januaron okazis jam la kvaran fojon la evento.

Teksto, speciale kreita, estis legata iun sabaton je la 11a horo en la unua programo de la landaj radio kaj televido kaj ankaŭ en Interreto. La diktaĵon

skribis pli ol 5000 entuziasmoj en ĉiuj regionoj de Litovio kaj ankaŭ en 28 aliaj landoj.

Testi siajn lingvokonojn povis ĉiu, kiu volis, inkluzive de lernantoj, sed escepte de spertuloj pri la lingvo (instruistoj, lingvistoj). Tiuj, kiuj faris maksimume unu eraron, pasis al la dua etapo. Fine ricevos premion la plej granda spertulo.

LAST



LAST

Testi siajn lingvokonojn povis ĉiu, kiu volis, inkluzive de lernantoj, sed escepte de spertuloj pri la lingvo (instruistoj, lingvistoj).



LAST

Teksto, speciale kreita, estis legata iun sabaton je la 11a horo en la unua programo de la landaj radio kaj televido kaj ankaŭ en Interreto.



LAST

Pli ol 5000 litovoj partoprenis nacian diktado-konkurson.

Murdo laŭ mendo

Plioftiĝas en ĉiuj landoj de Balkanio tiel nomataj pagitaj murdoj aŭ murdoj laŭ mendo. Laŭ fakuloj varias la kosto: inter 50 000 eŭroj por murdi per embusko ĝis miliono da eŭroj por murdi per eksplodaĵo aŭ kaŝpafisto. Konfliktoj, koleroj, venĝoj, kaj forigo de tiuj, kiuj tro scias pri diversaj fiaferoj, kialas por dungi murdiston.



REVOLUTE

La prezo ankaŭ dependas de la statuso de la viktimiĝonto. Forigi politikiston plej kostas: politikistoj estas ofte gardataj kaj do la prezo tion spegulas. Tre malofte la polico sukcesas kapti murdinton, malgraŭ tio, ke la albanaj instancoj identigis en la lastaj jaroj 23 murdojn laŭ mendo. Viktimoj inkluzivas ekleziaĵon islaman, industriistojn kaj prezidantojn de sport-federacioj.

La murdistoj fariĝas pli profesiaj. Ofte ŝajnas, ke la viktimoj mortis ne pro murdo sed dum rabado, pro akcidento aŭ eĉ pro naturaj kialoj.

Bardhyl SELIMI

La lasta en Eŭropo

La nova registaro de Litovio preparis „kontraŭkrizan planon”, kiu baziĝas sur totala ŝparado. La ŝparetoso kaptis ankaŭ la parlamentanojn, kiuj decidis ekde februaro rifuzi 15 % de siaj salajroj. La Eŭropa Komisiono (EK) laŭdis la novajn intencojn de Litovio dirante, ke la rimedoj devus havi sukceson. Tamen ili venas unu jaron poste ol averaĝe en Eŭropo.

EK en siaj prognozoj pri 2009-2010 indikis, ke la malgrandiĝo de la malneta enlanda produkto (MEP) kaj la senlaboreco en Litovio estos unu el la plej intensaj inter landoj de Eŭropa Unio (EU). La MEP de EU en la jaro 2009 malkreskos je 1,8 %, tamen poste komencos altiĝi kaj en 2010 jam atingos pluson de 0,5 %. Tamen Litovio komencis siajn ekonomiajn reformojn pli malfrue kaj tial pri revekiĝo ĝi paciencu iom pli longe. En 2008, kiam Eŭropo jam dronis en ekonomia stagnado, Litovio sukcesis konservi unu el la plej al-

taj kreskoindicoj. Tio tamen ne savis la landon de la krizo. Tial en 2009 litovoj atendu kvarprocentan falon. Nur danke al la rimedoj de la nova litova registaro, tiu falo ne daŭros tro longe.

Litovoj al kutimiĝu al senlaboreco, kiu atingos 8,8 %, samgranda kiel EU-averaĝo (8,7 %). La senlaboreco kaŭzos stagnadon de la salajra kresko. La inflacio en Litovio atingos 5,6 % en 2009 kaj 4,8 % en 2010.

Ĉefministro Andrius Kubilius tute ne miris pri la prognozoj de la EK. „La sperto montras, ke krizoj aŭ kreskoj en



Ĉefministro Kubilius ne miras pri la prognozoj por la landa ekonomio.

ĉiuj tri baltaj landoj (Litovio, Latvio kaj Estonio) estas tute similaj. Estas nur unu eco tipa por Litovio: ĉe ni ĉio malfruas.” Li menciis ankaŭ, ke suferojn por Litovio aldonos la fine de 2009 fermota nuklea elektrocentralo en Ignalina. Tio estis la kondiĉo por aliĝo de Litovio al EU. La nova centralo povos esti finkonstruita nur en 2018 kaj elektroponto al Pollando kaj Svedio nur en 2012.

Lastatempe la optimismo de la litovoj pri la ekonomia situacio en la lando draste malkreskis kaj atingis la nivelon de 2001. Povas esti, ke tio ankoraŭ ne estas fino. Enketado montris, ke dum la venontaj 12 jaroj ekonomian pliboniĝon atendas nur dekono de la litovoj. Precipe homoj maltrankviliĝas pro la situacio en labora merkato.

La dekstrula registaro en Litovio nun devos alfronti ekonomian krizon kaj samtempe konservi sian aŭtoritaton. Spertuloj rimarkas, ke la intencoj striktigi la buĝeton kaj limigi la atendojn de la popolo estas ĝustatempaj. Ju pli rapide la popolo konfrontiĝos kun la realeco, des pli facile eblos lanĉi ceterajn rimedojn por bone administri la ekonomion. Krome, krizo estas perfekta momento por homoj, kiuj antaŭe estis sufiĉe saĝaj kaj ŝparis grandajn sumojn, ĉar nun venis la plej favora periodo por elspezi ilin.

LAST



Lastatempe la optimismo de la litovoj pri la ekonomia situacio en la lando draste malkreskis kaj atingis la nivelon de 2001.

Kubo maljuniĝas

Kubo en Latin-Ameriko rangas kiel la dua lando rilate al la maljuneco de la loĝantaro. La naskokvanto falis (0,9 % en 2006 kontraŭ 2,5 % en 1953), la elmigrokvanto atingas 0,26 % kaj la kresko de la loĝantaro estas ege malalta (-0,04 %). Rezulte de tio la proporcio de homoj aĝaj je pli ol 60 jaroj estas 16 %, kaj oni prognozas 22 % en 2020. Laŭ kelkaj fakuloj, en 2025 ĉiu kvara homo estos maljunulo.



HARTLAUDMARTIN

Ne mirinde, do, ke en decembro 2008 la Nacia Asembleo aprobis leĝon, kiu altigas la emeritan aĝon al 65 jaroj por viroj kaj 60 por virinoj. Se oni ne farus tian decidon, la ekonomio

tutsimple ne eltenus la ŝarĝon. La ŝtato ne enspezis sufiĉe por subteni la pensiulojn. La proporcio de aktivaj laboristoj kontraŭ emeritoj falis de 3,7 al 3,1 en la periodo 1986-2006, kaj oni prognozas

1,5 en 2025. La emerita aĝo estis sub la mezumo en Latin-Ameriko (je du jaroj por viroj kaj je kvar jaroj por virinoj) kaj la mezuma vivodaŭro sufiĉe alta.

La fekundeco ĉe virinoj en 2007 estis nur 1,43. Kvankam post 1959 oni atingis eĉ 4,5, tio estis nur portempa afero; en 1978 ĝi jam estis nesufiĉa por teni la popolnombron. Unu el la kialoj estas la vastskalaj propagando por kaj aliro al kontraŭkoncipaj rimedoj, kaj la terure alta nombro de abortigoj (2,9 milionoj de 1968 ĝis 1992; 62 abortigoj por 100 naskitaj beboj). Alia kialo estas la gravaj problemoj pri loĝado, kiuj trenas post si grandan nombron da divorcoj kaj familiaj malfacilaĵoj.

La propono jam ŝvebis en la aero dum sufiĉe da tempo, sed al ĝia efektiviĝo instigis la dumtempe altega prezo de la petrolo, la paso de tri sinsekvaj uraganoj, kiuj skuis la landan ekonomion kaj postlasis perdon je 9,7 miliardoj da dolaroj, kaj la falo de la prezo de nikelo (41 % kompare kun la prezo en 2007). Krome estas la embargo.

Rezulte de tio la kresko de la ekonomio dum la pasinta jaro estis je 4,3 % anstataŭ la prognozitaj 8 %, kaj la buĝeta defcito atingis 4,2 miliardojn da kubaj pesoj. En tiaj kondiĉoj estas simple nepenseble teni senŝanĝa la emeritan aĝon. Tamen, por glatigi la aferon, oni planis transiran periodon je poioma altigo.

Alberto GARCÍA FUMERO



CONSUMERFRIENDLY

La ŝtato ne enspezis sufiĉe por subteni la pensiulojn.

Dikuloj maldikiĝu!

En Japanio komenciĝis nova sistemo pri medicina ekzamenado, kiun oni mallonge nomas „*Metabo*-ekzameno”. Oni interpretas la vortojn „metabola sindromo” kiel tro da internaĵa graso.

La japana ministrejo pri bonfarto kaj laboro enkondukis tiun sistemon por trovi suferantojn pro metabola sindromo el 57 milionoj da 40-74-jaruloj. Oni diras, ke duono de la viroj kaj kvinono de la virinoj suferas de tiu sindromo, kaj laŭ iu teorio *metabo*-uloj povos pli suferi pro cerbaj kaj koraj malsanoj. La registaro celas tri-kvaronigi la nombron de tiuj suferantoj kaj malmultigi la jaran elspezon por malsanuloj je 2000 miliardoj da enoj (12,5 miliardoj da eŭroj).

Kia homo estas *metabo*-ulo?

Estas kvar eroj por difini „*metabo*-ulon”

1. Ventromezuro

- Viro: pli ol 90 centimetroj
- Virino: pli ol 85 centimetroj
- 2. Alta glukozita kvanto
- Pli ol 110 mg/dl
- 3. Nenormaleco pri graso
- Pli ol 150 mg/dl de neŭtra graso aŭ malpli ol 40 mg/dl de HDL-kolesterolo
- 4. Alta sangopremo
- Pli alta ol 130 mmHg pri altsangopremo aŭ
- Pli alta ol 85 mmHg pri malaltsangopremo

Kiel la registaro traktos *metabo*-ulon?

Oni grupigas la ekzamenitojn jene:

1. Nepravaj helpatoj
 - havas pli da ventromezuro ol la normo.
 - trafas du erojn el 2, 3 kaj 4 de la supra difino aŭ trafas unu eron el 2, 3



COLONIO

Oni interpretas la vortojn „metabola sindromo” kiel tro da internaĵa graso.

- kaj 4 kaj fumas.
- 2. Instigataj helpatoj
 - havas pli da ventromezuro ol la normo.
 - trafas unu eron el 2,3 kaj 4 kaj ne fumas.
- 3. Informatoj
 - havas pli da ventromezuro ol la normo
 - trafas neniu el 2,3 kaj 4.



COLONIO

Lastatempe japanoj pli kaj pli dikiĝis pro usonstilaj vivmaniero kaj manĝaĵoj.

En Japanio ĉiuj civitanoj apartenas al iu sanasekur-organizaĵo, kaj supre menciitaj helpatoj kaj informatoj devas plibonigi sian sanstaton sub la gvido de tiuj organizaĵoj. Nepravaj helpatoj devas havi konkretajn, plenumendajn celojn por bonigi sian vivmanieron pri manĝaĵoj, ekzercado ktp. Komence ili havos intervjuon kun sanflegisto kaj dietisto kaj poste ricevados ties konsilojn per telefono kaj interreto dum 3-6 monatoj. Instigataj helpatoj havas same intervjuon kaj poste mem klopodas bonigi sian vivmanieron. Informatoj ricevados informon pri la graveco de bona vivmaniero.

Se tiuj helpatoj ne obeas aŭ ne ricevados la konsilojn de flegisto kaj dietisto, pretekstante okupitecon de sia laboro, kaj se la nombro de *metabo*-uloj ne malmultiĝas, tiu sanasekur-organizaĵo,

al kiu tiuj homoj apartenas, ricevos punon. Ĝi devos pagi pli da tarifo por helpi la sistemon pri maljunulara medicino. Tial maldikigi *metabo*-ulojn estas tre grave ne nur por tiuj uloj, sed ankaŭ por tiuj organizaĵoj.

Estas kritikoj pri tiu sistemo, sed ...

Iuj kuracistoj kritikas tiun *metabo*-ekzamenon. Ili opinias, ke tiu „normala” ventromezuro ne havas scienca bazon, kaj ili montras alian „fidindan” esploron, ke diketaj homoj estas la plej longvivaj.

Laŭ alia esploro pri rilato inter dik-eco kaj morto, al grupo de malalta mortokvanto apartenas viroj kun KMI (Korpomasa Indico) 23-26 (diketaj homoj) kaj virinoj kun KMI 19-29, kaj al grupoj de alta mortokvanto apartenas geviroj pli dikaj aŭ pli maldikaj. (KMI = korpa pezo kg / (alto m × alto m))

Laŭ tiu matematika esprimo mia nuna KMI estas:

$$61 \text{ kg} / (1,7 \text{ m} \times 1,7 \text{ m}) = 21,10$$

Mia antaŭa KMI estis:

$$75 \text{ kg} / (1,7 \text{ m} \times 1,7 \text{ m}) = 25,95$$



Ekzemploj de usonstilaj manĝaĵoj.



Laŭ tiu esploro, kiam mi havis dikan ventron kun diversaj malbonaj sansimptomoj, mi estis pli sana ol nun, kiam mi havas maldikan ventron sen tiuj simptomoj.

Ekefikis tiu kampanjo

Laŭ Instituto de Tut-Korpa Ekzameno, la sanstato de japanoj en 2007 iomete pliboniĝis. Ĝis 2006 japanoj pli kaj pli malsaniĝis, ekzemple en 1984, 29,8 % de ekzamenitoj estis sanuloj, sed en 2006, nur 11,4 %. Tamen en 2007 tiu proporcio altiĝis je 0,4 %. La instituto atribuis la kialon parte al la *metabo*-kampanjo, dirante: „En 2006 naskiĝis kaj furoris la vorto ‘*metabo*’. Homoj en siaj 30-40aj jaroj emas tuj reagi al la novaĵo kaj komencas preni rimedojn kontraŭ dikiĝo kaj dika ventro. Krome nia ĝisnuna kampanjo pri sano sukcesis”.

Lastatempe japanoj pli kaj pli dikiĝis pro usonstilaj vivmaniero kaj manĝaĵoj kiel hamburgeroj, terpomflokaj kaj Koka-kolao. Jam multaj sentis sin tro dikaj kaj tre malbelaj kun dika ventro, do tiu kampanjo pri *metabo* havis grandan eĥon en la socio. Tiu vorto disvastiĝis kaj nun japanoj havas pli da konscio pri sano.

HORI Yasuo

Litera sudoku

La reguloj de ĉi tiu speco de sudoku estas la samaj kiel por la cifera sudoku, nur ke la ciferoj 1 ĝis 9 estas 9 diversaj literoj kaj ke sur la unua horizontala linio griza la litera sinsekvo formas (radik)vorton (aŭ nombron litere skribitan).



MARY MUSES

Sendu la vorton antaŭ la 1a de majo 2009 al Flandra Esperanto-Ligo, Monato-enigmoj, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio aŭ rete al enigmoj@monato.net.

Inter la solvintoj Monato elektos tri personojn, kiuj ricevos libron kun 80 pliaj diversaj sudokuoj!

O		A		L	S	T		
	G					R		A
T	A		N					O
		S	I	O		G	T	
I		N	L					
		S	G				R	
	L						O	
R	N			A		I		S

La solvo de la giganta sudoku de Monato 8-9/2007

Gajnintoj: multaj provis solvi ĝin sed ne multe da sendis ĝustan solvon. 3 da povos ĝui pli da sudokuoj nome André Sandoz el Svisio, Ivan Moratinos el Hispanio kaj Lu Wanyi el Ĉinio.

Kore gratulas, via enigmo-redaktoro

652378941	346759128	751382496
349216578	798621534	389467521
781594326	512843679	426591837
926731854	631485297	614238975
574682139	257396841	297156483
138459762	984217356	835974162
413865297518463172985427163825749		
865927413769825964713586942713658		
297143685324179538462193578649213		
568942731	678235419	
342175986	129748635	
971836254	354619827	
394158726493518497236951784326519		
786329154687392681547862391587462		
512746839251647253891374256419738		
457981362	289346715	968741325
168234975	465179328	413258976
923567481	731528469	572693841
871692543897126735984673125834697		
245813697132854962173852649175283		
639475218654973814652194837962154		
931725468	421365978	
754386291	865729413	
862941537	739418562	
742365189563742895316987254691783		
593182476219385416297541386527941		
816974325478619723548236791438526		
971538642	257389164	867352419
425619738	136547982	523149867
638427591	498261753	149876235
389756214	563178429	475213698
164293857	874952631	918764352
257841963	921634875	632985174



Posedenda libraĉo

La diligenta historiisto Ziko van Dijk liveris plian kompilaĵon el la arkivoj de UEA. *La Asocio* estas tre diversspeca kolekto da artikoloj pri la interna vivo de la organizaĵo dum ĝiaj unuaj cent jaroj. Ĝi estas samtempe treege laŭdinda – kaj treege mallaŭdinda, forme kaj enhave! La formo estas tre profesie konceptita: fontoindikoj (sed ne pli) en piednotoj, listo de mallongigoj, nomindekso, eĉ super-teksta ĉiupaĝa titolo en griza kursivo. Vere estis plezuro vidi tion, sed malplezuro estis multaj lingvaj kaj kompostaj fuŝetoj; mi nombris entute 181, kies graveco etendiĝas de diskuteblaj vortelektaj kaj forgesitaj citiloj, tra manko de la vorto „ne”, ĝis tutaj linioj enŝoviĝintaj el Dio scias kie.

Parto de la mislingvaĵoj eĥas arkaismojn kaj erarojn en la fontotekstoj; ekzemple, la lingvaĵo de Eduard Stettler estis tiel erarplena, ke oni prefere ne citu lin rekte. La uzo de absolutaj sinonimoj, eĉ ene de la sama artikolo (ekzemple, cifereca kaj diĝita, alekti kaj koopti), donas konfuzan impreson. En la treege utila artikolo „Historio de la historio de Esperanto” Ziko recenzas 23 verkojn. Li plurloke prave riproĉas aŭtoron, kiu ne sufiĉe interpretas la fontojn, sed kion oni do pensu vidante, ke li mem eĉ ne tradukas anglalingvajn citaĵojn? Ankaŭ la kutimo referenci al homoj per ilia nacia deveno, kie ripeto de la nomo estus troa, ofte ne bone funkcias.

Krom la menciitan recenzaron, la libro enhavas solidan raporton pri la historio de Biblioteko Hector Hodler, kaj *Kiel nin organizi?*, resumon pri la evoluo de la UEA-statutoj. En ĝi iom ĝenis min la oftaj komparoj inter UEA-strukturo kaj ŝtata reĝimo. UEA ne estas ŝtato; multe

pli interese estus kompari ĝin kun aliaj civitanaj internaciaj organizaĵoj kaj kun la ĝenerala asocia vivo de la landoj, kie ĝi havis sidejon (do tiurilate estas bonvena la iom ampleksa klarigo pri nederlanda asocia juro). Fine estas dek pli leĝeraj artikoloj pri unuopaj jaroj. Kelkaj el tiuj (almenaŭ 1942 kaj 1955) estas iom tro bagatelaj por inkluzivi en libron, sed tiu pri 1959 kredeble estas la plej bona peco verkita de Ziko ĝis nun.

Ĉu historiisto devas esti neŭtrala? Tio nemulte gravas, se la leganto konas la pozicion de la historiisto, tiel ke oni povas reĝustigi la interpretojn laŭ siaj propraj vidpunktoj. Ziko siatempe esprimis admiron pri la germana socialdemokrata ekskanceliero Helmut Schmidt kaj pri ties persona amiko, la usona eksministro pri eksteraj aferoj Henry Kissinger. Tio estas rimarkinda en si mem; inter samgeneraciaj, samlandaj kaj similrangaj famaj politikistoj la plimulto de esperantistoj verŝajne preferus respektive Willy Brandt kaj Adlai Stevenson. Sed eĉ pli, mi suspektas ke la nuanco inter Brandt kaj Schmidt pli gravas por Ziko ol, ekzemple, la diferenco inter Stalin kaj Gorbaĉov! Lia koncepto pri „vasteco de pensado” sur paĝo 80 povus esti indiko de tio.

Estas Schmidt, kiu diris ke „homoj, kiuj havas viziojn, devus konsulti kuraciston”, kaj se Ziko subtenas tiun vidpunkton, oni komprenas lian megalofobion (la tendencon bagateliĝi ĉion, precipe la atingojn de aliaj; kontraste megalomanio estas la tendenco grandiozigi ĉion, precipe sin mem). La megalofobio estas bridita kaj pozitive funkcias en 1959: *Fighiera en Varsovio*, kiu priskribas la preparadon de la Zamenhof-jubilea Universala Kongreso. Ziko klare komprenigas, kiuj estas liaj herooj kaj malherooj, sed la herooj ne estas superhome perfektaj, kaj la malherooj ne estas demonoj. Eĉ la ĉefa malheroo

Gian Carlo Fighiera – kiu iris naivega al Varsovio kaj revenis paranoja – estas priskribita kiel diligenta kaj kapabla Konstanta Kongresa Sekretario. Megalofobio en Esperantujo kutime signifas ankaŭ Lapenna-fobion, kaj aliloke en la libro Ziko tion montras abunde; sed en ĉi tiu artikolo Ivo Lapenna estas la plej pozitiva rolanto.

Estas Lapenna, kiu diris (en la UK-inaŭguro 1962), ke „eble ni atingos eĉ la finan venkon jam en ĉi tiu generacio”. Oni devas miri, kial Ziko ne mencias tiun evidentan (por nia tempo) mistakson en 1966: *Propono al UN* (kun la subtitolo *Kial Lapenna ne fariĝis heroo de Nov-Jorko*). La megalofobio ĉi tie estas senbrida, kio praktike senvalorigas la artikolon. Ekzemple ĝi komence parolas pri „magraj rezultoj” de la Unesko-rezolucio de 1954, kio mildadire estas iom aŭdaca resumo de ĉapitro 22.3.5 de *Esperanto en Perspektivo*. Karakterize, ankaŭ ne estas menciita la „Skandinavia propono” al Unesko en 1966, pri esploro de la bezono de internacia lingvo; se ĝi estus renovigita en 1968, la propono al UN povus esti decide influita. Entute do, Ziko ne nur maljuste riproĉas Lapenna pri aferoj fakte laŭdindaj, li ankaŭ preterlasas la plej gravajn faktojn kaj sekve plene maltrafas tiujn *efektivajn* mispaŝojn de Lapenna kaj de UEA kiel tuto, el kiuj nuntempa aktivulo eventuale povus ion lerni.

Resume, la libro estas haviginda por ĉiu, kiu interesiĝas pri UEA kaj ĝia historio, kvankam nepras kritike legi ĝin. Sed tio ja rekomendindas pri historiaj studoj entute.

Jens S. LARSEN

Ziko van Dijk: *La Asocio: skizoj kaj studoj pri la historio de UEA*. Eldonis FEL, Antverpeno, 2008. 301 paĝoj kartone binditaj. ISBN 978 90 77066 37 9.

Prezo ĉe FEL: 24 eŭroj + af franko

ŜATOKUPOJ

Pri la nobla pasio hobia

Koncerne la sencon de vorto *hobia* ekzistas disputoj. Oni havas multe da okupoj dum sia libertempo, sed ĉu ĉiun ni povus nomi hobia? Nature, ne. Hobio estas ŝatata, preferata okupo, per kiu la individuo akiras certajn konojn kaj scipovojn, pliriĉigas siajn informojn pri la mondo kaj kontaktas kolegojn. Praktikante ĝin, oni ne nur pasigas utilajn kaj agrablajn horojn, sed ankaŭ malstreĉiĝas. Pli realeca kriterio

por difini hobiajn estas la intelekta motivo. La hobiaĵo kiel fenomeno havas psikologiajn aspektojn: kreon de anima ekvilibro, elementon de ludo, venkon super malmultvalorecaj travivaĵoj, batalon kontraŭ fremdiĝo.

En hobia eblas atingi gravajn rezultojn. Ekzemple eblas renkonti neprofesiulojn, kiuj havas surprize profundajn konojn pri kinologio (scienco pri hundoj). Ili senerare distingas ĉiujn hundra-

sojn kaj difinas la hibridojn; ili konas la konduton de hundoj. Imponaj estas ankaŭ la konoj de amatoroj akvarestoj pri iĥtologio. Ili posedas rarajn speciojn de fiŝoj, kiuj ne videblas eĉ en la akvarioj de zoologiaj ĝardenoj.

Hobia estas persona enlogiĝo, kiu akiras ankaŭ socian gravecon. En sia historia evoluo arto kaj scienco ŝuldas multon al hobiaj, kiuj kelkfoje atingas nekredeblajn rezultojn.

La hobiaĵo en juna aĝo havas alian gravan socian signifon – ĝi helpas al profesia orientiĝo. Ne maloftas la kazoj, kiam hobia transformiĝas al profesio kaj la koncernatoj konsideras sin feliĉuloj, ĉar ili ordinaras trovas plenan kontentiĝon. Kelkfoje ĉio komenciĝas per bone organizita kaj lerte gvidata rondeto.

Bunta kaj multfaceta estas la mondo de hobiaj. Kio igas la homon amatore okupiĝi pri io aŭ alio? La motivoj estas diversaj, ĉar ili estas difinitaj de multaj faktoroj: biologiaj, psikologiaj, sociaj. Dum la elekto de profesio dependas ankaŭ de vico da objektivaj faktoroj, ĉe la elekto de ŝatokupo homo spontane manifestas siajn internajn inklinojn, kio aparte gravas por la anima harmonio.

Gravan rolon ĉe la elekto de hobia havas la inklinoj de individuo, kiuj determinas ties guston kaj preferojn. Kaj vere, en la granda varieco de enlogiĝoj oni povas distingi ankaŭ sentojn kaj imagojn de la infana kaj adoleska aĝoj. La motivadon de hobiaj ni povas similigi al grandega buketo el diversaj plantoj, ĝermantaj el la semoj de la heredaj talentoj kaj kies radikoj estas enterigitaj en la familia medio. Iliaj tigoj estas traborintaj al si vojon, balancate de la ventoj de sociaj influoj kaj malsame varmigite de la radioj de disponigitaj eblecoj.



La hobiaĵo en juna aĝo havas alian gravan socian signifon – ĝi helpas al profesia orientiĝo.

Hobio estas intime ligita kun la valorecaj orientiĝoj de homo. Indiko pri la ekzisto de tiu aŭ alia valoro estas la sento pri senco. Fojfoje ekestinta iumanie-re, la sento pri senco de aparta aktivado transformiĝas en senton pri difinita maniero de ekzistado kaj poste en propran senton pri senco de la vivo. Laŭ la viena psikoterapeŭto Viktor Frankl unu el la plej gravaj bezonoj de homo estas la bezono atribui al sia vivo sencon kaj, se tio ne okazus, la rezulto estus neŭrozo.

Plue ni devas konsideri la fakton, ke la profesia aktivado ne ĉiam sufiĉas. Kial? Unue, ĉar homo havas diversajn, eĉ kontraŭajn internajn emojn kaj ili devus manifestiĝi sur iu kampo. Due, ĉar la amatora agado estas libera je streĉo. Hobio, kiel aktivado, kombinite kun pozitivaj emocioj kaj finkonstruita stereotipo de la okupo, estas jam ekvilibriga faktoro, relativa konstanteco, oazo, kiu kontraŭstaras la rapidemon kaj necertecon.

Kia estas la preventiva kaj kuraca efiko de hobia? Antaŭ ĉio la efiko konsistas en la kreo de pozitivaj emocioj, kiuj konkuras kun la negativaj kaj kutime venkas ilin. Ekzemple maltrankvileco kaj timo ne ekzistas ĉe homo, kiu ne okupiĝas pri si mem, sed estas aktive absorbita de eksteren direktita, preferata kaj agrabla amatora aktivado. Pro tio en la programoj pri superado de krizaj statoj devige partoprenas engaĝiteco, venko super la koncentriĝo je propraj malbonaj travivaĵoj. Hobiulo iompostiome estiĝas saĝa homo. Li havas sian pasion kaj ne volas perdi siajn tempon kaj humoron je malagrablaj bagatelaĵoj.

Alia efiko de hobia estas la eduka efiko al la karaktero, konduto kaj estetika gusto. La neceso esti konsekvenca fortikigas la volon kaj senton pri respondec kaj devo. La perfektigo de konoj plialtigas la personan kulturon kaj estetikajn postulojn. Sekve de tio oni spirite pliriĉiĝas kaj plimoderiĝas.

Hobio estas stabila apogo, je kiu la individuo povas kalkuli en sia dinamika kaj ne ĉiam facila vivo. Ĝi trankviligas, kontentigas, kreas humoron, alportas feliĉon spite al ĉiuj malfeliĉoj, kiujn

ofertas vivo kaj igas pli facila la solvodon de malfacilaj problemoj. En tio konsistas ĝiaj profilaktikaj funkcioj.

Sendube unu el la plej gravaj ecoj de ĉiu hobia estas la kreo de memsento, de certeco je si mem, de sento pri propra graveco, sento pri solidareco kun la samhobiuloj, de konvinkiteco pri la „afero“, de fiereco pri la atingoj, de prestiĝo pro la kompetenteco pri difinitaj temoj. Tamen oni devas esti sincere malfermita al la mondo kaj ĝiaj mirindaĵoj. La

natura sciamo kaj vigla interesiĝo estas potencaj faktoroj de orientiĝo, la bezono kreadi dominas. La hazardo kaj efiko de medio direktiĝas al tiu aŭ alia objekto, al tiu aŭ alia aktivado, al tiu nobla pasio, nomata hobia.

Elektinte hobion, oni eniras la rondon de entuziasmitaj kaj engaĝitaj amato-roj. Oni brulas kaj vivas en la riĉenhava mondo, plena je feliĉaj travivaĵoj, kontento kaj sana vivfilozofio.

Dimitar HAĜIEV



Sendube unu el la plej gravaj ecoj de ĉiu hobia estas la kreo de certeco je si mem.

Ĉina koncerto en Vatikano



En majo en laŭcela salonego de Vatikano Ĉina Filharmonia Orkestro de Pekino kaj Ĥoruso de la Ŝanhaja Operejo ludis la rekviemon de Mozart antaŭ la papo kaj la kurio. Omaĝo al Benedikto la 16a, certe! Por evidentigi, ke la muziko reprezentas tutmondan lingvaĵon, substrekis ĉinologoj; por komenci per kvieta vojo la novajn rilatojn inter Pekino kaj Vatikano, flustris esperemaj ekleziuloj; por kontraŭpezi per nova iniciato la tibetajn embarasojn, diris la malpli simpatiantaj komentantoj. La iniciato, tamen, estis planita jam antaŭe. Oni informis, ke la germankultura kaj pianludkapabla papo Ratzinger multe ŝatis kaj aplaudis la koncerton kaj afable konversaciis kun la orkestranoj.

Armando ZECCHIN

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENC
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09
HUMURA LITERATURO EN
ESPERANTO



Informoj, aliĝoj

Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org

Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu

OSIEK: <http://osiek.org>

Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturoj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo. Certe ĝi rangas apud la noveloj de Trevor Steele; kaj el la ĉefaj novelmajstroj de nia pasinteco, apud tiuj de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilagyi.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbutiko.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

anoncetoj

La Verda Stelo, <http://tetrapentos.over-blog.com/> enhavas 3 partojn: 1) Tetrapentos, 2) Stelo, 3) La Ora Stelo. La tria parto estas tradukita al pluraj lingvoj; mi emus doni pli da tradukoj al tiu parto. Se tio interesas vin, iru al <http://tetrapentos.over-blog.com/article-16071723.html>

Se vi tradukos tiun paĝon al via naci-lingvo kaj sendos tiun tradukon al mi, mi pagos vin sendante al vi unu ekzempleron de La Ora Stelo (aŭ Verda Stelo, se vi elektas la ludon, kiu enhavas ĉiujn pecojn verdajn). Antaŭ ol komenci tradukon, bonvolu skribi al jacques.ferroul@laposte.net por scii, ĉu neniuj jam komencis traduki.

Vizitu Ipernity, la virtualan Esperanto-vilaĝon, kie pli ol 1700 Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Jak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
ikk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto



Ĉu vi jam legis?



Plej furoris en 2008

1. Ziko van Dijk: La Asocio
2. Wendy Heller: Lidia
3. Stephan Lang: La talpočasisto
4. La Jaro 2009
5. Anna Löwenstein: La ŝtona urbo
6. Edwin de Kock: Sub fremdaj ĉielo
7. Katalin Kovacs: Poŝamiko
8. Petro De Smedt: Zakwoordenboekje/
Poŝvortareto Esperanto-Nederlands-Esperanto
9. Lena Karpunina: Neokazinta amo
10. Ziko van Dijk: Informado praktike
11. Stefan MacGill: Nemave edifi
12. Ludoviko Zamenhof: Fundamento
de Esperanto (hungara)
13. Alberto Fernandez: Kalejdoscopa rememoro
14. Carlo Collodi: La aventuroj de Pinokjo
15. Wandel/Galadi: La kosmo kaj ni (2a eldono)
16. Sen Rodin: Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj
rakontoj
17. Ilustrita oficiala radikaro
18. Petro De Smedt: Nederlands Esperanto
Nederlands
19. Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj
20. Hergé: Tinĉjo en Tibeto
21. Anna Löwenstein: Morto de artisto
22. Hergé: La Nigra insulo
23. Sagao de Njal
24. Sten Johansson: Krimo de Katrina
25. Andrzej Pettyn: Humuro laŭ la skota
maniero

La jenaj 25 verkoj en la Butiko de Flandra Esperanto-Ligo plej furoris en 2008.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en www.retbutiko.net, sed vi povas kompreneble skribi ankaŭ per la „klasika poŝto” al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.